

Ludwig Uhland,  
Die Kapelle

Droben stehet die Kapelle,  
Schauet still ins Tal hinab.  
Drunten singt bei Wies' und Quelle  
Froh und hell der Hirtenknab'.

Traurig tönt des Glocklein nider,  
Schauerlich der Leichenchor;  
Stille sind die frohen Lieder,  
Und der Knabe lauscht empor.

Droben bringt man sie zu Grabe,  
Die sich freuten in dem Tal:  
Hirtenknabe, Hirtenknabe!  
Dir auch singt man dort einmal.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 - †1862-13-11).*

*Arg-639-1286 (2012-11-02 16:53:38)*

*Vidu:*[http://meister.igl.uni-freiburg.de/gedichte/uhl\\_103.html](http://meister.igl.uni-freiburg.de/gedichte/uhl_103.html). *Pri la poeto vidu la vikipediejon*  
[http://de.wikipedia.org/wiki/Ludwig\\_Uhland](http://de.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland).

*La poemo estas kantebla laŭ melodio verkita de Conradin Kreutzer. La melodio estas aŭdebla tie:* <http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/drobenst.html>.

Ludwig Uhland,  
La kapelo

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Supre staras sur la monto  
La silenta kapeleto,  
En la valo, ĉe la fonto  
Ĝoje kantas paŝtisteto.

Sonorado, mortkantado  
Nun eksonas tra l' silento, -  
Haltas knabo en kantado  
Kaj aŭskultas kun atento.

En la tombojn de l' monteto  
El la valo ĉiu venos.  
Ankaŭ vin, ho paŝtisteto,  
Oni iam tien prenos.

*Traduko de la Germana poemo "Die Kapelle" de LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 - †1862-13-11) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 - †1917-04-14).*

*Arg-639-1288 (2012-11-02 16:27:28)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas ankaŭ en* [www.literaturo.dk/kapelo.htm](http://www.literaturo.dk/kapelo.htm), *ene de la listo*  
<http://www.literaturo.dk/enhavo.htm>.

Ludwig Uhland,  
La kapelo

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

Supre tronas sur la monto  
La kapelo en kviet'.  
En la valherbej' ĉe l' fonto  
Ĝoje kantas paŝtknabet'.

Kun funebra sonorilo  
Ektimigas mortkantad'.  
Finas tuj la ĝojjubilo  
De la knabo ĉe l' konstat'.

La ĝojintoj post la morto  
Supren en la tombojn venos  
Paŝtoknabo, laŭ la sorto,  
jen ja Morto vin eĉ prenos.

*Traduko de la Germana poemo "Die Kapelle" de LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 - †1862-13-11) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

*Arg-639-1290 (2012-11-02 09:10:10)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en* <http://www.cezarpoemtradukoj.cezarpoezio.de/213.html>.